

Oomoto

1
9
7
2

Jul.-okt.

Bone inaŭguriĝis “la ekspozicio de artaj verkoj de Onisaburo kaj de lia skolo” en Parizo!

Eizo Ito

La 18-an, okt., en la Muzeo Cernuschi, ĉio estis jam preta por akcepti vizitantojn por “la ekspozicio de artaĵoj de Onisaburo kaj de lia skolo”. Oni donis al la japana karavano el 188 membroj de Oomoto aŭ de Univerŝala Homama Asocio, atinginta Parizon la 17-an, la honoron esti la unuaj vizitantoj.

La tuta unua etaĝo de la muzeo estis komplete rearanĝita por taŭge prezenti la unikajn verkaĵojn, speciale transportitajn el Japanujo. Por ĉiu el la prezentaĵoj donis la plej delikatan, artisman atenton s-ro Vadime Elisseeff, direktoro de l' muzeo, rilate la klasifikan grupigon kaj elmetadon kiel ankaŭ lumon kaj harmonion. Ĝustaj objektoj en la ĝustaj lokoj!

Super la ŝtuparo, kondukanta la vizitantojn de la teretaĝo al la unua etaĝo, sur la muro, oni unue vidas la grandajn bildojn de Bodi-Darmo kaj de Avalokiteŝvaro, desegnitajn de Onisaburo. Sekvas, sur aliaj muroj, kaligrafiaĵoj kaj desegnaĵoj de Hidemaru, lia bofilo, kiuj montras aparte subtilajn, eĉ mistikajn liniojn. En la unua ĉambro sur bretoj sidas entute 44 ceramikaĵoj: bovloj, vazoj, teleroj k. a. faritaj de Naohi, lia filino, kiu nun estas la gvidantino de la tuta Oomoto-movado. Ĉe la pasejo al la ĉefa ĉambrego pendas sur muroj kelke da Kimonoj, kies ŝtofoj estas teksitaj kaj tinkturitaj de Naomi, la plejaĝa filino de Naohi. Por la tinkturado ŝi uzis nenian kemiaĵon, sed nur la sukojn el herboj, floroj kaj ŝeloj de arbo kaj fruktoj; do la ŝtofoj portas tre naturajn kolornuancojn.

Nun la ĉefa ĉambrego por la verkoj de Onisaburo. Vere brilas la

Oomoto

47-a jaro

n-ro jul.-okt.

(385-388), 1972

monata organo de Oomoto kaj Univerŝala Homama Asocio (eldono: dumonata)

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio (por alsendo de abonkotizo, manuskriptoj, informoj, k.s.):

OOMOTO, Kameoka,
Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561.

Posta ĝirkonto: Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono (1971): 24 steloj (1.70 usona dol.; 6.00 ned. gld.)

Reprezentantoj de Oomoto, ĉe kiuj estas pagebla la abonkotizo, troviĝas en 24 landoj.

Pagebla ankaŭ rekte al la administracio de Oomoto, aŭ al Univerŝala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam -2, Nederlando.

Cirkulas en ĉ. 80 landoj.

AVIZO

Japandevenaj vortoj, kiujn ni de temp' al tempo uzas sen glosoj en ĉi tiu revuo, estas troveblaj en EJ (= *Enciklopedieto Japana*).

Brilbovloj, ĉiu sur sia breteto de aparta alteco, grupigitaj laŭ la koloroj razura, blua, verda, flava, purpura, karmezina ktp. Ĉiu bovlo tamen brilas kun sia delikata kombino de l' nuancoj. Alte supre sur la muroj staras gigantaj desegnaĵoj de granda pinarbo aŭ de trankvilaj pejzaĝoj de montoj kaj riveroj. Japanoj, kiuj eĉ ofte havis la okazon ilin apreci, estas sorĉitaj de la mirinda komponado el ritmoj kaj tonoj, kiu kreas ian ĉielan simfonion, ne aŭdeblan sed klare senteblan. Multaj oomotanoj estas larme kortuŝitaj de la fakto vidalvida, ke nun la verkoj de Majstro finfine havas la okazon esti dece aprecataj en la deca loko de la monda ĉefurbo de la arto! La verkoj ne nur de Majstro Onisaburo, sed ankaŭ de la gemajstroj, kiujn ili tiel amas kaj respektas!

Lastvice estas la ĉambro por la kaligrafiaĵoj kaj desegnaĵoj de Sumiko, edzino de Onisaburo, kies originaleco ne estas facile alirebla por la ĝeneralaj okcidentanoj, sed tiom pli alloga por tiuj kiuj posedas la apreĉkapablon. Ankaŭ ĉe unu el la simplaj desegnaĵoj de Naohi, unu franca raportisto staris kvazaŭ alnajlita dum dekoj da minutoj senmove. Ne estas landolimoj en la mondo de la arto.

La unua tago de la inaŭguro estis destinita ne nur por la japana karavano, sed eĉ pli grave por la ĵurnalistoj. Ili ja tre multope venis, proksimume 160 el plej diversaj



Ekspoziciejo en Muzeo Cernuschi maldekstre: Kaligrafiaĵoj signifantaj "lumecon" kaj "lumon" dekstre: brilbovloj

taggazetoj kaj artkriticistaj rondoj, propraokule rigardis la ekspoziciaĵojn, aŭskultis la entuziasman komentadon de s-ro Elisseeff.

Kio igis lin decidi fari ĉi tiun ekspozician aventuron? Omaĝi la 100-jaran jubileon de la glora urba muzeo de Parizo per la longdaŭra dumonata ekspozicio de tiuj fremdaj verkaĵoj de nekonataj aŭtoroj! Kiam antaŭlastjare li vidis la fotojn de l' verkoj de Onisaburo, li jam ekhavis la ideon pri ekspozicio, tiel, ke li faris specialan vojaĝon al Japanujo por persone priesplori la realajn verkojn. En la Centro de Oomoto, li estis forte impresita ne nur de la verkoj de Onisaburo, sed ankaŭ de la fakto, ke tie, inter liaj posteuloj, spiras la karakteriza vivo, en kiu la arto, la religio kaj la vivo estas kunfanditaj en mirinda harmonio. Agrable forŝovita estis lia longjara bedaŭro pri la tendenco, ke la arto nur kuras la vojon de teknika originaleco, perdinte la ligitecon kun la spirito kaj la vivo. Lia ideo pri la ekspozicio fariĝis neskuebla decido kun la espero, ke ĝi certe donos al la spektantoj ne nur la senton de vivĝojo sed ankaŭ la sugeston pri nova vivmaniero de la homoj.

En la dua tago, la 19-an, okazis la oficiala akcepto por la eminentaj personoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ kelkaj reprezentantaj figuroj de Esperanto-movado en Parizo. La subskribinto de tiu ĉi artikolo jam en la unua tago havis la grandan ĝojon hazarde trovi inter la ĵurnalistoj unu germanan esperantiston. Kiam tiu demandis, ĉu mi parolas angle, mi respondis, ke ne, sed jes en Esperanto. “Mi ankaŭ lernis Esperanton antaŭ tridek jaroj”. Eksonis agrablaj vortoj el lia buŝo kaj komenciĝis libera interparolo inter ni. Li bone komprenis ĉion kion mi diris, kvankam li mem parolis iom malrapide. Mirinda afero ke lingvo iom lernita antaŭ tridek jaroj kaj verŝajne ne uzata poste, nun tiel bone utilas!

Post fervora mesaĝo de la muze-direktoro sekvis la saluto de japana ambasadoro, s-ro Joŝihiro Nakajama, kiu siavice ankaŭ laŭdis la mirindan grandecon de la persono de Onisaburo. En la nomo de s-ino Naohi, s-ro Kjo-taro Deguĉi, ŝia filo, verkinto de la bonege vendita libro “Vojaĝo tra Esperantujo”, faris saluton en la franca lingvo. Iu esperantisto flustris: “Kial ne en Esperanto por tradukiĝi francen?” Alia diris, “Eble pro prudento”. Ankoraŭ unu alia diris, ke ĉia propagando estas malpermesita. Eble jes, eble ne. Ĉiuokaze ni scias, ke la franca registaro nun klopodas refortigi sian lingvon en internacia medio; do konsekvence estas malfavora kontraŭ iu ajn alia lingvo kiu pretendas fariĝi la internacia. Tiel povus esti ia negativa etoso kontraŭ nia lingvo en tiu ĉi lando ĝenerale. Sed tiom



Spektantaro en la Japana Vespero



Klasika danco en la Japana Vespero

pli ni devas energie labori por nia afero, ne perdante tamen la prudenton en necesa okazo.

Ĝuste en la vespero de la dua tago de l' inaŭguro okazis agrabla evento fare de la esperantistoj kun granda sukceso. Jena cirkulero estis dissendita:

La Pariza Federacio de la esperantaj kultur-centroj UEA-UFE petas vin ĉeesti la japanan vesperkunvenon, kiu okazos sub la aŭspicioj de Oomoto kaj Universala Homama Asocio, la 19-an de oktobro 1972 de la 7-a ĝis la 10-a vespere en la Muzeo GUIMET, 6 place d' Iena, Parizo XVI-a. Programo: prelego kun diapozitivoj de s-ro Eizo Ito pri Japana Kulturo, ekstraktoj de Noo-dramo, muziko, kantoj kaj dancoj kun partopreno de profesiaj japaninoj. La alta kvalito de tiu ĉi prezentado, okaze de la inaŭguro de la ekspozicio pri la verkoj de ONISABURO en la muzeo Cernuschi (apud la parko Monceau), donas maloftan oportunon por ke vi invitu ankaŭ neesperantistajn geamikojn kaj elmontru al ili ĝuste la kulturen avantaĝon scipovi la Lingvon Internacian.

La simila kunvokilo estis sendita ankaŭ al la membraro de SAT-Amikaro en kaj ĉirkaŭ Parizo. La kunlaborado de tiuj gravaj esperantistaj organizoj en Parizo vere promesis la sukceson de la kunveno.

La salono de la fama muzeo Guimet, estis plenigita de pli-malpli 300 vizitantoj, inter kiuj eble pli ol duono estis esperantistoj. S-ro Jean Thierry tradukis la parolojn por la neesperantistoj, kiuj do ankaŭ povis ĝui ĉiujn

programerojn kaj agnoski la utilecon de Esperanto. Sen speciale brua anonco ni povis kunvoki tiom da homoj kaj tio per si mem mirigis la oficistojn kaj de la Japana Ambasadato kaj de la menciita muzeo. Bele elmontrita estis la forto de la esperantistoj, kiam ili agis en bona konkordo. Ili plu planas grandgrupajn vizitojn al la ekspozicio kaj ankaŭ la duan "Japanan Vesperon" kun rearanĝotaj programeroj.

La 20-an, vendrede, de 18-a horo okazis la oficiala akcepto fare de s-ino Nicole de Hauteclocque, Prezidantino de la urba konsilantaro de Parizo, en la salono de la urbodomo, por la gravaj koncernatoj de la Ekspozicio. Ĉirkaŭ kvindek membroj de Oomoto kaj U. H. A. inkluzive la membrojn de Deguĉi-familio kaj s-ron Tooko Kon, japana senatano, invitiĝis. Ili ĝuis la belegajn artaĵojn kiuj ornamas la urbodomon, kaj poste aŭskultis la ĝentilan saluton de s-ino Nicole de Hauteclocque, dankvortojn de s-ro Kjotaro Deguĉi kaj s-ro Elisseeff, k. a. Sekvis gajaj interparoloj kaj emociaj tostoĵoj. Tiel manifestiĝis plej alta respekto de urbo Parizo por la Ekspozicio.

Antaŭ ol fini ĉi tiun raporton mi devas dediĉi almenaŭ kelkajn liniojn por mencii pri la Teo-servo farata en la speciale formita teĉambro sur la teretaĝo sub la ekspoziciejo. La longaj ŝtuparaj muroj estas kovritaj per kurtenoj, sur kiuj de loko al loko pendas grandformataj kolorfotoj de la ĝardenpasejo, eĉ ankaŭ de la kaŭrlavejo por ke la vizitantoj povu imagi en si, kvazaŭ ili paŝus sur tiu ŝtonvojo al la teĉambro kaj fine lavus al si la manojn kaj buŝon ĉerpante la akvon, kiel decas por eniri la ĉambron. Sur la sankta muro de la ĉambro pendas skribaĵo de s-ino Sumiko sugestanta la

Kiu voluntus

preni sur sin la reprezentantecon de "Oomoto" por abonperado en sia lando, kies nomo ne troviĝas en la listo de niaj landaj reprezentantoj bonvolu, ni tre petas, skribi al ni.

— *La Administracio*

senlimajn gracojn de la Ĉielo kaj Tero. Floroj en vazeto sur la kolono. Kaldroneto kun jam bolanta akvo sur la fajrujo. Bonodoro de incensaĵo naĝanta tra la aero. Ĉiuj iloj sur sia ĝusta loko. Jam ne mankas io por ke la gastoj sidiĝu kaj trankvile atendu la eniron de la gastigantino.

Baldaŭ s-ino Majuko Deguĉi, edzino de Kjotaro, eniras portante bovlon kaj tevjon k. a. kaj pretigas la teon elegante manipulante la ilojn kun ĉiuj movoj laŭregule. La gastoj ricevas kukon kaj tuj poste bovlon da verda teo. Ĉu la teo gustis al ili agrable aŭ strange? Almenaŭ ili gustumis la pacan atmosferon, kiu certe trankviligis al ili la animon.

Aliĝu al Secubunfesto de Oomoto per alsendo de hitogatoj

Karaj gefratoj!

Kiel kutime en la pasinteco, ni invitas vin partopreni per hitogatoj la Secubun feston de Oomoto, kiu okazos tra la nokto de la 3-a ĝis la mateno de la 4-a, februaro, 1973, en Mirokuden-preĝejo, Ajabe.

La vorto *Secubuno* signifas la “ŝanĝigon de sezonoj”: ĝi markas la finon de vintro aŭ la antaŭvesperon de *Riŝuno* (Ekprintempo), laŭ la luna kalendaro, kiam la ekliptika longitudo, aŭ la angulo de la suna orbito rilate al la ekvatoro, atingas 315 gradojn.

Japanoj festas Secubunon tra la lando ĉe ĉiuj tradiciamaj familioj kaj jaŝiroj—kun la folklorkreda rito de ekzorcado, kaj tiel ili eniras en la novan sezonon aŭ novan jaron.


La *Secubunfesto de Oomoto* havas, krom tio, aparte gravan signifon, ĉar ĝuste je la tago de Riŝuno (Ekprintempo) en 1892, la Prapatra Dio manifestis sin per Nao Deguĉi, fondintino de Oomoto, por anonci al la mondo, ke “revenis la tempo por Dia regado” kaj ke, post reformado de la mondo, la homaro eniros en Novan Epokon. Do Secubuno estas la plej solena festo de Oomoto por la purigado de ĉiuj pekoj.

La Secubuna rito de Oomoto estas plenumata en du partoj: unu estas la Purigado de la Universo, kiu okazos de 19:00 ĝis 20:00 de la 3-a de Feb., kaj la alia estas la

Purigado de Individuaj Personoj, kiu daŭros pli ol sep horojn ĝis la aŭroro de la 4-a. La Purigado de Individuaj Personoj estos plenumata per hitogatoj.

Hitogato estas laŭvorte “homfiguro” farita el japanpapera slipo en formo de kimono. Ĉiu partoprenanto surskribas sur ĝi siajn nomon, aĝon kaj adreson. La hitogatoj tiel surskribitaj de milionoj da homoj el ĉiuj partoj de la lando kolektiĝas en amasoj ĉe la Oomoto-Centro. Oni metas ilin sur la altaron de Mirokuden-preĝejo, Ajabe. Tie okazas la soleno kaj preĝo por peko-purigado al ĉiuj homoj aliĝintaj per hitogatoj. En la daŭro de la tranokta recitado la preĝvortojn fare de miloj da oomotanoj, la kolektitaj amasoj de hitogatoj disiras de la altaro al ducent geservantoj, kiuj deklamas la personajn nomojn unuope de la hitogatoj kaj enmetas ilin unu post unu en argilajn potojn. Cent servantinoj, nomataj “seoricuhime”, procesie forportas la potojn al la rivero Ŭaĉi, kie la diservantoj ĵetas de sur la ponto la hitogatojn en la riveron. La hitogatoj forportas ĉiujn niajn pekojn.

Al kelkaj tio ŝajnus simbolisma rito de peko-purigado, al multaj aliaj — nur superstiĉo. Sed por tiuj, kiuj konas la rolon de konkreta *formo* kiel esprimilo de la spirito, ĝi estas grave realisma.



Secubuna rito de Purigado

Kiuj konsentas kun tiu nia kredo kaj kiuj interesigas en tiu ĉi rito, volu surskribi kun via preĝo la enmetitajn hitogatojn per la nomoj, aĝoj (ne-nepre), kaj adresoj (urbo/lando) de vi, viaj familianoj kaj amikoj. Se la hitogataj folioj ne sufiĉas, volu multobligi ilin el via papero, kaj sendu ilin ĉiujn tiel ke ili atingos nin ĝis la 31-a de januaro 1973. Ni atendas la alsendon de viaj hitogatoj en kiom eble plej granda nombro. Spirite — nepre partoprenu la solenon kaj preĝou je la ĉisupre menciitaj horoj! La purigado de ĉiuj niaj pekoj estas la nepra kondiĉo por Mondpaco.

Sincere viaj

La Administracio de Oomoto
Kameoka, Kioto-hu 621, Japanujo



Hitogatoj

ANIM-KALENDARO

(donita de D-ro Rudolf Steiner — daŭrigo 3)

V **Dudekdua Semajno** (1a — 7a Septembro)

22 La lum' el mondovastoj,
En la intern' daŭrigas forte sian vivon :
Fariĝas ĝi animolumo
Kaj brilas en spiritprofundojn,
Por liberigi fruktojn,
Kiuĵ Hom-Memon el la Mondo-Memo
En tempokuro maturigas.

W **Dudektria Semajno** (8a — 14a Septembro)

23 Aŭtune moderiĝas
La ĉarmstrebado de la sensoj ;
En lumrevelacion jam miksiĝas
Neklaraj vualoj de l' nebuloj.
Mi mem alvidas en la spacovastoj
De la aŭtuno vintrodormon.
Somero al mi estas
Sin mem nun fordoninta.

X **Dudekkvara Semajno** (15a — 21a Septembro)

24 Sin mem kreante daŭre
Animestad' sin mem perceptas ;
La mondspirito, ĝi celadas
En kon' de l' mem revivigita
De la memsenso volofrukton.

Y **Dudekkvina Semajno** (22a — 28a Septembro)

25 Mi aparteni rajtas nun al mi
Kaj ekbrilante plivastigi enan lumon
En spaco- kaj en temp-mallumon.
Al dormo min premadas la estaĵ' natura,
Profundoj de l' anim' maldormi decas

Kaj maldormante porti sunoardojn
En fridajn vintrofluojn.

Z **Dudeksesa Semajno** (29a Sept. — 5a Oktobro)

26 Natur', patrinan cian praestadon,
Mi portas ĝin en mia volestajo ;
Kaj fajrpotenc' de mia volo,
Ĝi ŝtalas la impulsojn de spirito mia,
Por ke ĉi tiuj nasku la memsenton
Por porti min en mi.

A Ŭ T U N O

A **Dudek-sepa Semajno** (6a — 12a Oktobro)

27 Penetri en profundojn de l' estaĵo mia :
Sopiron alsentadoplenan ekestigas,
Ke mi, min mem priobservante, trovas
Kiel somerosundonacon, kiu kiel ĝermo
En la aŭtunetoso varmigante vivas
Kiel la fortimpulso de l' animo mia.

B **Dudek-oka Semajno** (13a — 19a Oktobro)

28 Mi povas en intern' reviviĝintajn
Eksenti de l' estaĵo propra la vastecojn
Kaj fortoplene pensradiojn
El la animsunpovo
Al vivenigmoj solvadante sendi,
Plenigi multe da deziroj
Al kiuj la espero jam flugilojn paralizis.

C **Dudek-naŭa Semajno** (20a — 26a Oktobro)

29 Lumadon de l' pensado al mi mem
En la intern' ekflami fortoplene,
La travivitan sencoplene klarigante
El fortojfonto de la mondsprit',
Estas al mi someroheredaĵo,
Estas aŭtunripozo kaj espero por la vintro.

D **Trideka Semajno** (27a Okt. — 2a Nov.)

30 Ekŝprucas en animsunlum' al mi
Maturaj fruktoj de l' pensado ;
En la certecon de la memkonscio
Ĉiu sentad' sin aliigas.
Plenĝoje jam mi povas senti
De la aŭtun' spiritovekiĝadon :
La vintro en mi vekos
Animsomeron.

E **Tridek-unua Semajno** (3a — 9a Novembro)

31 La lumo el spiritprofundoj,
Eksteren penas sunsimile :
Fariĝas ĝi je viv-volfort'
Kaj brilas en neklaron de la sensoj,
Por ke ĝi liberigu fortojn,
Kiu krepevojn el animimpulsoj
En homoverko maturigas.

F **Tridek-dua Semajno** (10a — 16a Novembro)

32 Mi sentas propran forton fruktigantan
Sin fortigantan al la mondo doni min ;
Mian prorestaĵon sentas mi fortanta
Por turni sin al la klareco
En la teksad' de l' vivosorto.

G **Tridek-tria Semajno** (17a — 23a Novembro)

33 Nur tiel sentas mi la mondon,
Kiu aparte de l' animkunvivo
Je si nur frosta kaj malplena vivo
Kaj sen la povo konigante sin,
En la animoj rekreante sin,
En si la morton nur ektrovi povus.

Trad. H. Joh. Theissen
(Nederlando)

(*Datrigota*)

La Esperanto-movado en Hindujo

En 1963 mi estis verkinta kaj eldoninta sesdek-kvar-paĝan historion de “tutmonda esperanto-movado” en bengala lingvo. Mi sendis ekzempleron de tiu libro al profesoroj, verkistoj kaj aliaj profesiuloj en West Bengal. Mi estis ankaŭ ricevinta multajn respondojn. La enhavo de la respondoj estis ege variaj kaj interesaj. Iu fama juristo kaj verkisto respondis ke li lernis esperanton kiam li estis nur lernanto en 1905 ; sed poste li ne plu sekvis la esperanto-movadon. Alia fama lingvisto kaj profesoro de universitato skribis ke li multe interesiĝas pri esperanto. Li deziris ke mi daŭrigu la movadon en Bengalujo ; k. t. p.

En 1950 S-ro T. Sekelj kiel ambasadoro de UEA traveturis la Hindan subkontinenton. Li vizitis ankaŭ Nepalon kaj Cejlonon. S-ro Sekelj instruis esperanton al Aĉarja Vinoba Bhave, la fama disĉiplo de Mahatma Gandhi kaj soci-reformanto. Poste alvenis S-ro Milioviĉ kiu gvidis kur-

son en Nepalo kaj ankaŭ vizitis Santiniketan kaj aliajn lokojn en Hindujo kaj parolis pri esperanto al neesperantistaj kunvenoj.

Fakto estas, ke esperanto eniris Hindujon sub la kondiĉoj de angla superregado, kaj anglaj oficiroj enkondukis la lingvon en Hindujon jam en 1905.

En 1926 D-ro Poška el Litovujo vizitis Hindujon. Li gvidis kurson por anoj de la YMCA en Calcutta kaj restis kelkajn monatojn en Santiniketan kaj parolis pri esperanto al D-ro Rabindranath Tagore. Fakte lia lernanto S-ro Pravat Ghosh tradukis la dramon “Poŝtofiĉejo” de Rabindranath Tagore el bengala originalo. Laŭdire tiu traduko iam aperis en la fama “Literatura Mondo,” kaj la manuskripto ankoraŭ troviĝas en Tagore-Muzeo en Santiniketan.

Mi mem esperantistiĝis en Decembro 1928 en Stockholm, Svedujo kaj de tiu tempo mi verkadis plurajn verkojn : la plej lasta estas “Jaroj sur

tero” eldonita de S. E. Eldonejo. Post mia reveno en Hindujo mi daŭre dum la lastaj kvardek jaroj instruis esperanton al multaj hindoj sed nur en 1963 mi kaj mia ekslernanto S-ro Abani Halder sukcesis fondi la “Bengala Esperanto-Instituto” kaj starigis bibliotekon. S-ro Halder konstante de tiu tempo instruis esperanton. Feliĉe li vizitis la landojn de Eŭropo kaj spertis la utilon de esperanto en internacia vivo. Li estas tre arda esperantisto. Nuntempe li laboras en Gandhigram en suda Hindujo. Li estas dumviva membro de UEA. En Delhi S-ro Seoti Prakash kun helpo de S-ino Haudebine starigis la Hindan Instituton de Esperanto. Bedaŭrinde S-ro Seoti Prakash tragedie mortis antaŭ nelonga tempo por savi dronintan virinon en la rivero Gango en Hardwar en norda Hindujo. Lia forpaso estas granda perdo por tuthinda movado. Li havis ideon kaj vigle laboris por esperanto. Espereble Hinda Instituto de Esperanto daŭrigos la movadon.

Mi maljuniĝis kaj tial mi donacis la bibliotekon (ĉirkaŭ kvincent esperantaj verkojn de Bengala Esperanto-Instituto) al Nacia hinda biblioteko en Calcutta, kie juna esperantisto S-ro Probal Daŝgupto vigle laboras por esperanto. Li ofte verkas artikolojn pri esperanto kaj ankaŭ instruas la lingvon.

Miaparte mi esperantigis multajn junulojn kaj inter ili estas miaj du filoj, nome Animesh (24 jara) kaj Nikhiles (19 jara). Laŭ invito de ‘Oomoto’ Nikhiles veturis al Japanujo en pasinta jaro kaj espereble li fariĝos vera esperantisto. Same ankaŭ Animesh intencas baldaŭ veturi al Svedlando. Mi esperas ke miaj filoj en fremdaj landoj spertos veran utilon de esperanto kaj fariĝos bonaj esperantistoj. Jen estas mallonga historio de la esperanto-movado en Hindujo.

Mi venis al la konkludo ke plej multaj junaj hindoj kiuj lernis kaj lernas esperanton ne havas kontakton kun tutmonda movado pro la cirkonstancoj en la subkontinento. Tio estas bedaŭrinda afero. En Japanujo, ‘Oomoto’ vigle kaj konstante laboras por la tutmonda Esperanto-movado kaj frateco de la homaro. Ni esperu ke ‘Oomoto’ estonte sukcesos helpi ankaŭ la Esperanto-movadon en aliaj landoj de Azio. Cetere multaj hindoj kaj azianoj studas en la landoj de Eŭropo, Ameriko, Kanado, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. La esperantistoj de tiuj landoj eble povas, se oni deziras, kontakti kaj interesigi la hindajn lernantojn en siaj landoj. Ni — ĉiuj esperantistoj — semu kaj semadu konstante la lingvon por internacia interkompreno kaj frateco de la homaro.

La naturaj faktoroj de kuracado (2)

PSIKOTERAPIO

(*kuracado per la menso*)

La homo estas fragila kreitaĵo, kiu dependas de la fizika kaj morala medioj en kiuj li vivas. Ekde sia naskiĝo (kaj eĉ antaŭ tio, kiam li ankoraŭ troviĝas en la patrina utero) li estas avida je amo kaj tiu avideco nur ĉesas kun la morto.

Kiam la amo ne fluas al li en sufiĉa kvanto (reale aŭ ŝajne) aŭ kiam ĝi tute ne direktiĝas al li, la neamato aŭ malamato sin sentas ŝokita. Tiam li strebas al (re)akiro de l' amo aŭ se tio ne eblas, li ekfunkciigas diversajn mensajn meĥanismojn por sin defendi (eskapo, substituo, sorbado, malŝargo, mildigo, adaptiĝo, k. t. p.).

Normale tiuj meĥanismoj sufiĉas por elporti la ordinarajn moralajn agresojn. Sed kiam ĉi lastaj estas tro fortaj, ili venkas tiun defendkapablon, kaj tiam estiĝas en la cerbo de la individuo psika "dorno", konscia en la komenco, poste tre ofte nekonscia, kiu ekscitas la nervajn centrojn kaj perturbas la koncernajn aparatojn kaj organojn. Jen ekzemple kelkaj efikoj de ne-

daŭraj malŝargoj de psika dorno: akcelita marŝado, ekscitaj gestoj, movoj kaj paroladoj, akcelitaj (kelkfoje malakcelitaj) korbato, intestaj movoj, sekrecio de stomaka suko, k. t. p.

Tiuj vojoj de malŝargo varias laŭ la individuoj kaj laŭ la diversaj cirkonstancoj en la sama individuo.

Se la dorno estas tro ŝargita kaj ne povas spontanee malŝargiĝi laŭ tiuj ordinaraj vojoj, ĝi "kistiĝas" en la cerbo, kaj tiam daŭre perturbas diversajn aparatojn kaj organojn. Tiuj perturboj, komence nur funkciaj, fariĝas poste organaj, kaj povas eĉ kaŭzi lezojn pli-malpli gravajn.

Multaj malsanoj (ne nur neŭrozoj) atribuitaj al la plej diversaj kaŭzoj estas fakte kaŭzitaj, almenaŭ parte, de psika traŭmato, kiu sub formo de "dorno" malekvilibriĝas la sanon: astmo, alta sango-premo, neŭralgioj, digest-, haŭt-, kor-, hepat-, metabol- kaj endokrinaj malsanoj, k. t. p.

Krome, malpliigante la rezistokapablon, kaj sekve la naturan imunecon, la psika traŭmato povas ankaŭ faciligi la agadon de mikroboj, virusoj, toksoj, parazitoj, k.t.p.

Nu, la laboro de la psikoterapeŭto konsistas en reduktado aŭ, se eble, eliminado de tiu psika dorno. Tiucele li devas enketi pri la familia kaj socia medioj de la paciento kaj ties rilatoj kun la aliaj personoj.

Nepre necesa kondiĉo por sukcesa rezulto estas ĝusta rilato inter kuracisto kaj paciento: tiu-ĉi devas plene konfidi al la kuracisto, kaj tiu-ĉi dum la kunsidoj devas plene apogi kaj pravigi la pacienton. Jen la farotaj paŝoj:

Unue la kuracisto devas rememorigi al la paciento la malagrablojn (malŝato, ofendo aŭ insulto, maljustaĵo, k. t. p.), kiuj estigis lian psikan dornon. Simpla rakonto de la okazintaĵo ne sufiĉas. Helpe de la kuracisto, la paciento devas reveki aŭ prezenti denove al si en la spirito ĉiujn cirkonstancojn kaj detalojn de la afero kun laŭeble ĉiuj originaj emociaj nuancoj. Ju pli detala, fidela kaj viveca estas la reproduktado de la malagrabloj per la rememoro, des pli kompleta estos la malŝargo kaj liberigo.

La dua paŝo estas la emocia reguligo de la paciento. Baza principo estas, ke la homo intime sentas favoran inklinon por la proksimulo; sed li estas submetita al neevitebla agado de fortoj, kiuj impulsas lin al agreso kaj detruo, laŭ la dinamiko de amo kaj jaluzo.

La kuracisto devas senkulpigi kaj la pacienton kaj la personon kun kiu li estas en konflikto. Jen kelkaj praktikaj ekzemploj:

S-ro A kverelas kun sia neobee-

ma kaj kritikema filo B. Oni eksplikas al A, ke B tiel kondutas ĉar li estas jaluzo pri sia frato C, kaj kredas (aŭ sentas), ke tiu-ĉi estas pli amata ol li; la agmaniero de A estas ĝusta, sed tamen liaj riproĉoj al B devas ĉesi, kaj li devas distribui egalmezure sian amon al ambaŭ filoj. Tio restarigas la reciprokan konfidon kaj la perditan konekton. Sekve de tio la simptomoj de la malsano de A baldaŭ pliboniĝas.

Se B estas la paciento, li devas rememori la okazaĵojn, kiuj estigis ties psikan dornon. Oni eksplikas al li, ke la netoleremeco kaj rigoreco de la patro (aŭ frato, k. t. p.) ne ŝuldiĝas al malŝato aŭ malamo, sed al jaluzo de tiu, kiu sin kredas malpli amata. Neniu kulpas pri tio; sed ambaŭ nur faris erarojn. Tio senpezigas la emocian sferon de B, kaj ties simptomoj sekve pliboniĝas. Oni konsilas al li kiel agi: li ne insistu pri sia ribeleco kaj li distribuu egalmezure sian amon al ambaŭ gepatroj (aŭ fratoj, k. t. p.) por ke ĉesu la jaluzoj kaj sekve la agresemo. Kompreneble, oni ankaŭ devas esplori la eksterfamilian medion en tiuj kazoj.

Ofte okazas ĉe paro rompo de harmonio pro jaluzo. Ekzemple, la edzino tro zorgas pri sia bebo aŭ infano kaj sekve iom malatentas sian edzon. Tiu-ĉi sin sentas neglektata kaj kredas, ke ŝi amas lin malpli ol antaŭ la naskiĝo de la infano. La edzaj rilatoj tiam malvarmiĝas; aperas malakordoj kaj konfliktoj, kiuj povas atingi ankaŭ

la infanon. Io simila ofte okazas pro troa alligiteco de unu el la geedzoj al sia propra patr(in)o. La kuracisto senkulpigas ambaŭ homojn kaj komprenigas al ili la kaŭzon de la miskompreno. Post la malŝargo, normaliĝas la emocia sfero de la paciento.

Kiam la av(in)o loĝas kune kun siaj fil(in)o kaj nepoj ofte aperas malakordoj kaj konfliktoj inter la du unuaj, kiuj pleje ŝuldiĝas al jeno: la av(in)o tre dorlotas sian nepon kaj senkulpigas lin, kiam li estas malbonkondata kaj la patrino intencas lin riproĉi aŭ puni. La patrino sin sentas (aŭ sin kredas) senrajtigita de sia propra patrino kaj senigita je ties amo pro la etulo. Tiu-ĉi, sekve, devas ankaŭ suferi la patrinan ĵaluzon. Tiu malharmonia situacio malbone influas la sanon de la diversaj membroj de la familio, ĉefe de la av(in)o kaj fil(in)o.

Post la malŝargo de la psikaj dornoj, oni eksplikas al la avino, ke ties troa dorlotado kaj senkulpigo de la nepoj estigas kaj intensigas la ĵaluzon de la filino, kiu sekve de tio montriĝas agresema kontraŭ ŝi. Verdire la filino tute ne malamas ŝin; ŝi nur agas tiel pro simpla ĵaluzo. La avino devas moderigi kaj eĉ ĉesigi sian dorlotadon, almenaŭ en la ĉeesto de la patrino, kaj devas ankaŭ pravigi ĉi lastan ĉe ties riproĉoj aŭ punoj al la infanoj.

Ni insistas pri grava detalo: en la ĉeesto de ĵaluza persono, oni nepre evitu fari tion, kio provokas

lian ĵaluzon. En multaj okazoj, kiam la familia bonfarto tion postulas, estas eĉ konsilinde adopti la "teknikon de l' ofero": ŝajnigi antaŭ la ĵaluza persono, ke oni ne plu estimas, ŝatas aŭ amas la personon kontraŭ kiu estiĝis la ĵaluzo.

Simila procedo estas ankaŭ aplikota al la elradikigo de ĉiuj psikaj dornoj estigitaj de alispecaj familiaj kaj eksterfamiliaj situacioj.

La tria paŝo de la psikoterapeŭto estas emocie rekonekti la pacienton kun la persono kun kiu estiĝis konflikto. Se tio estas sukcese atingita, kaj ambaŭ normaligas siajn rilatojn, baldaŭ malaperas aŭ malpliĝas la simptomoj de la malsano.

Ekzistas diversaj teknikoj de la psikoterapio, jen individua, jen kolektiva (psikodramo, k.t.p.); sed kiu ajn ĝi estas, oni devas ĝin apliki pura, sen drogoj kaj farmaciaĵoj, kiuj nur povas perturbi kaj kompliki la sanstaton de la paciento.

Kelkfoje ne eblas funde esplori la psikajn malfacilaĵojn pro la rezisto aŭ kontraŭstaro de la paciento, kiu obstine volas ignori kelkajn malagrablajn partojn de la realo, kiuj lin afiktas. Kvankam la venko de tiu kontraŭstaro estas la ĉefa tasko de la kuracisto, en kelkaj okazoj tiu-ĉi devas kontentigi per fortigo de liaj psikaj defendoj. Li preskribas ŝanĝon de aktivecoj, sportojn, vojaĝojn, alcelajn legaĵojn, k. t. p. Ĉiaokaze la parolo,

kiu konsolas kaj kuraĝigas, efikas kiel vera kuracilo.

Valora kompletigaĵo de la psikoterapio estas la mensa kaj muskola malstreĉiĝo laŭ la jena procedo:

En trankvila kaj iomete mal-luma ĉambro, la paciento sidas sur komforta seĝo aŭ apogseĝo kun alta dorso kaj oportunaj brakoj; aŭ prefere li kuŝas sur lito aŭ divano kun la brakoj iomete fleksitaj kaj la kruroj iom apartigitaj. Fermi la okulojn kaj peni resti tute trankvila kaj serena, nenion pensante, nenion farante.

Sugestii al si, ke la dekstra mano estas peza. Ripeti mense aŭ mallaŭte:

“Mia dekstra mano estas peza... tre peza... tre peza... pli kaj pli peza... Mia mano pezas multe... multe... pli kaj pli, pezas pli kaj pli... pezas kiel plumbo... kiel plumbo... Mi sentas, ke mia mano estas pli kaj pli peza... Mi estas komplete malstreĉita, ĉiuj miaj muskoloj estas molaj kaj malrigidaj. Ju pli molaj kaj malrigidaj ili estas, despli malstreĉita mi sentas min. Mi sentas min trankvila kaj kvieta; komplete malstreĉita... Ĉar mi estas komplete malstreĉita, mi sentas plian pezecon. Mi timas nenion... Mi forgesis ĉion... Nenio ĝenas min, ĉar mi estas komplete malstreĉita... kaj mia mano estas pli kaj pli peza... tiel peza... ŝajnas, ke ĝi estas el plumbo. Mia tuta korpo estas malrigida kaj mola, kvazaŭ ĝi estus ĉifona pupo. Mi sentas nun, ke mia dekstra

brako iĝas ankaŭ peza, tre peza... tre peza...” (Ripeti la samajn sugestiojn, kiujn oni faris por la mano). Poste daŭrigi same kun la maldekstra mano dum 20-30 sekundoj, ripetante multfoje la samajn vortojn.

Estas necese multe insisti, ripeti kaj “remaĉi” pli-malpli la samajn vortojn.

En postaj ekzerciĝoj oni faras same kun la dekstra kruro; poste kun la maldekstra. k. t. p.; kaj finfine kun la tuta korpo.

Oni devas fini ĉiun ekzerciĝon nuligante la sugestiojn pri pezeco: “Nun mia mano (aŭ brako, kruro, k. t. p.) ne plu estas peza; mi povas libere kaj facile movi ĝin”. (Fleksi kaj etendi la manojn, brakojn, k. t. p., plurfoje, kun energio).

Spiri profunde kaj malfermi la okulojn. Oni povas praktiki tiun ekzerciĝon unu aŭ du fojojn tage, po 10 ĝis 15 minutoj, dum la posttagmeza ripozado, kaj nokte, kiam oni enlitiĝas.

Kiam oni atingas la senton de pezeco, oni facile ekdormas kaj la ripozo estas komplete. Tio helpas refreŝigi la fortojn kaj trankviligi la spiriton.

Kelkfoje pro timo aŭ alia kaŭzo estiĝas ĉe la paciento nekonscia rezisto aŭ kontraŭstaro, kiu malfaciligas aŭ eĉ malebligas la malstreĉiĝon.

Eĉ la plej sindona klopodado de la psikoterapeŭto restos vana, se la paciento mem ne kunagas pere de

Vojaĝo al Grekujo

Mia aviadilo forflugis el Londono, trans la Alpoj, al Rimini, superbela feriejo, situanta nord-oriente de Italujo, laŭ la Adriatika marbordo. Du Esperantistoj jam atendis min ĉe la flughaveno kun verda flago en la mano. Ili estis S-ro Grassini, profesoro pri historio ĉe urba kolegio kaj lia fratino. Kun ĝoja ekkrio mi tuj salutis ilin. Ni festis la renkontiĝon per glasoj da vermo; ni tagmanĝis kune kaj gajhumore interbabiladis. La ŝipo al Grekujo forveturis je krepusko. La sekvantan tagon mi atingis Atenon.

La 46 blankaj kolonoj de la Templo de Partenon, en perfekta beleco de harmonio kaj simetrio, leviĝas supre sur la sankta monteto Akropolis, la centro mem de la nekalkuleblaj ruinoj dismetitaj tra la tuta lando. Grekujo fakte imponis al mi per siaj majestaj historiaj

propraj mensaj kaj spiritaĵoj: bonaj, optimismaj, konstru-kapablaj pensoj; kaj ĉefe la fido, kiu plej gravas: fido al si mem, al la kuracisto kaj pri la terapio uzata de tiu-ĉi.

Se malgraŭ ĉio li ne fidas, li

postsignoj kaj jarmilaj temploj, kie iam vagadis la dioj de la Greka mitologio. Neniu ja povus forgesi, se li vidis por la unua fojo, la urbon de Ateno, de kie fontis la okcidenta civilizacio kaj kiu vere estas la trezorejo de la glora pasinteco. Mi vidis la nekredeblan kontraston inter la moderna Ateno kaj ties elegantaj bulvaroj kun multegaj oficejoj, unuflanke, kaj la praepoka Ateno, kiu fieras pri la plej grandaj kaj plej malnovaj kulturaj heredaĵoj de la homaro, aliflanke. Tute certe Grekujo esence diferencas en karaktero de la ceteraj mondopartoj, prezentante ion tute apartan al ĉiu vizitanto. En efektiveco, Grekujo ekposedis min dum mia dektaga vizito, ĝi tamen plej verŝajne daŭre tenos miajn memorojn dum la tuta vivo!

Mi restadis kvar tagojn en Ateno, ĉirkaŭvizitante vidindaĵojn

almenaŭ devas havi esperon resaniĝi, klopodante ĝin atingi pere de intuicio aŭ rezonado.

Oni helpu la firman volon sin kuraci pere de mensaj ekzerciĝoj koncentriĝante sur la atingota celo.

(*Datrigota*)

kaj renkontante tieajn Esperantistojn, kiuj afable gvidis min tra la rave bela urbo. Mi ja konstatis ke la utileco de Esperanto estas nepridubbla. Mi havis unikan ŝancon veturi kvin horojn per aŭto al antikva Delphi, kie sub hele lazura ĉielo, staras la sankta monto de Parnaso, hejmo de la dioj de Poezio, dense kovrita de ĉiamverdaj olivkaj oranĝ-arboj, eŭkaliptoj kaj cipresoj. Mi laŭiris la "sanktan vojeton" el malebenaj pavimŝtonoj al la Templo de Apolo, antaŭ kiu mi pie kaj adore klinis mian kapon. La apuda muzeo estas unu el la plej interesaj, tiom pro la riĉeco de siaj kolektoj, kiom pro la kvalito de la objektoj prezentitaj.

Alian tagon mi plue direktis min per ŝipo al Patraso por viziti la Templon de Olimpia Zeus, kie, en la oka jarcento antaŭ Kristo, oni ekbruligis torĉon per sunradioj por la unuaj Olimpiaj Ludoj. La 2700-jara stadiono restas konservita ankoraŭ ĝis hodiaŭ en sia originala formo. Mi vagadis sur la mistera tereno kun profunda emocio kaj meditado.

De Ateno mi marveturis proksimume dek horojn al Korfu, sonĝema insulo de floroj kaj naturbelajoj, sur la blua maro de la Adriatiko, kie la marakvo estas pure-pura kaj kristale travidebla, estante absolute libera de tiel-nomata "naturomalpurigo". Beleco, oni diras, estas en la okulo de la vidan-

to. Kio plaĉas al unu rigardanto povas malplaĉi al alia. Pri beleco de tiu ĉi insulo tamen ĉiuj konsentas unuanime. La tuta fabela urbeto de Korfu sin banas dormeme en ora sunbrilo; la temperaturo staris je 30 C. en frua Aprilo; estis do sufiĉe varme kaj mi trovis kelkajn, kiuj naĝas. Pro la alta nombro da sunbrilhoroj kreskadas ĉi tie subtropikaj vegetaĵoj de aparta beleco. La pentrinde sorĉa aspekto de la idilia naturo kun gastamaj homoj tiom ravis min, ke mi sentis, kvazaŭ mi troviĝus en vera paradizo. Butikumi estas vera plezuro pro la moderaj prezoj. Mi estis bonŝanca, ĉar ĝustatempe estis festivalo de Pasko; ĉe vesperiĝo la urbanoj vestitaj en tradicia greka kostumo kantis kaj dancis sur la placo en akompano de gitaroj kaj tamburoj. En la hotelo oni preparis por mi specialan bongustajon kaj abunde regalis min. Estis ja unika nokto kaj neniam mi povos forgesi la plezuron de tiu travivaĵo.

Tre bedaŭrinde tamen mia arda espero viziti Jugoslavujon estis trompita, rezulte de disvastiĝo de variolo, kiu malebligis al la ŝipo eniri en la havenon de tiu sopirata lando; sekve neeviteble mi devis ŝanĝi mian originalan planon kaj reiri al Rimini de Italujo, por flugi hejmen al Londono, riĉa je rememoroj, kiuj apartenas al unu el la plej belaj kaj inspiraj en mia vivo.

ŜTUPOJ

de Hermann Hesse

*Samkiel floroj velkas kaj junaĝo
Oldiĝas, same ĉiu vivepoko
Floriĝon havas, ĉiu virt' kaj saĝo
Je sia temp' ; ne ĉiam devas daŭri.
La koro pretu, laŭ la vivovoko,
Adiaŭ diri kaj komenci ree,
Por kun kuraĝo kaj sen ekbedaŭri
Aliajn, novajn interligojn plekti.
Al nova starto sorĉo venas ĉee,
Helpeme, por en vivo nin protekti.
De spac' al spaco paŝu ni serene,
Ne alkroĉiĝu ni al hejmintimo ;
Ne rolas limi nin la Mondanimo,
Sed levi nin ŝtupŝtupe, senkatene.
Apenaŭ ni en hejma rond' eknestas,
Jam el komforto fontas letargio ;
Nur kiu pretas pluvojaĝi, tiu
De bremsa kutimiĝ' libera restas.
Ankoraŭ eble eĉ la mortohoro
Forsendos nin al nova spac' sen limo ;
De l' vivovok' neniam sonos fino. . .
Vi adiaŭu do kaj sanu, koro !*

Esperantigis E. Sonnenfeld (Urugvajo)

Noto : Hermann Hesse (1877 — 1962), germana poeto kaj verkisto, influita de Orienta religia pensado, verkis la ĉi-supran poezian perlon, kiu aperis anekse al la konata utopia romano “La bidoludo”. — La Tradukinto

La Pinbosko de Anykščiai

Tradukis Klemensas Naudrius

Pri la aŭtoro

Antanas BARANAUSKAS naskiĝis 1835 en malriĉa litova familio de terkulturistoj (en Anykščiai). Fininte la elementan lernejon, kelkajn jarojn li estis skribisto en subaj oficejoj administraciaj, ĉiam serĉante eblecon por plua kleriĝado. Finfine li sukcesis eniĝi en pastran seminarion kaj fariĝi katolika pastro, pli poste, ŝtupo post ŝtupo, atinginte episkopan seĝon.

La estonta poeto jam en sia knabaĝo, paŝtante brutaron, kantadis la de li mem kunmetitajn kantetojn. Fariĝinte klerulo, post la studado en Peterburga pastra akademio, li emis sin okupi pri lingvistiko kaj matematiko, korespondis kun landaj kaj eksterlandaj sciencistoj. El la poezia sfero lia plej brila verko estas “La Pinbosko de Anykščiai” — admirinda naturkanto en litova poezio. Ne seninterese estos menciitaj ties naskiĝon. En la pastra seminario de Varniai, kiun Baranauskas frekventis, ties profesoro polo Gabsziewicz, leginte pecon el “Sinjoro Tadeo” de Mickiewicz, tro altigis la lingvon polan kaj neis la litovan, kiel “taŭgan nur por paŝtistoj kaj malkleruloj”. Tio, laŭ la esprimo de la poeto, “rekte kiel tranĉilo pikis la koron” kaj li decidis pruvi, ke la antikva lingvo litova nenion cedas al iu ajn alia lingvo por esprimi eĉ la plej subtilajn poeziecajn nuancojn. Kaj li tion brile pruvis. Nune la menciita lia poemo estas tradukita en kelkajn fremdajn lingvojn, ĉi tie ankaŭ en Esperanton.

A. Baranauskas mortis en 1902

*

- Montoj multstumpaj kalvaj, ebenoj senarabaj!
Kiu nun kredas vian belecon pasintan?
Kien do via ĉarmo estinta foriĝis?
Kie kvietaj viaj murmuroj en vento,
5. Kiam flustris folioj de l' blanka arbaro
Kaj maljunaj pinarboj kun krak' ŝanceliĝis?

- Kie via birdaro — birdetoj, birdidoj,
 Kies dolĉa pepado koron trankviligas ?
 Kie bestetoj, bestoj, ĉiuj animaloj ?
10. Kie kaŝtruoj, kavoj, nestegoj de bestoj ?
 Ĉio pereis, sole nur kelkaj pinaĉoj
 Restis morne staradi sur kampo dezerta ! . . .
 Per branĉetoj, strobiloj kaj pingloj sternitan,
 Sun' bruligas surfacon nun jam senutilan,
15. Kies vidado onin afliktas pro ŝajno :
 Kvazaŭ ĝi estus fajre ruina palaco,
 Kvazaŭ tie dezertus urbo ekstermita
 Aŭ tuberplena marĉo arbara post brulo ! . . .

- En la arbaron vi venas ajnan fojon antaŭe —
20. Eĉ la okuloj ekmiras, kor' kaj anim' jubilas,
 Ke vi dolĉsente hezitas, kie do staras vi nun :
 En arbar', en paradizo, eble eĉ en ĉielo ?
 Ajna rigardo belajojn verdajn, sveltkreskajn ĝuas,
 Ajna flarado arbaron plaĉan, odoran sentas,
25. Ajna aŭdado susuron, gajan flustradon kaptas,
 Ajna sentumo trankvilon mildan, koran perceptas.

- Musko-kusenoj molegaj, sur la tero sternitaj,
 Kapon admonas kaj treme lulas iom tuŝitaj.
 Beroarbustoj plenverdas, kvazaŭ tufoj de rutoj,
30. Levante siajn maturajn berojn ruĝajn kaj nigrajn.
 Sur fon' brunverda, ruĝeta buntas punktoj de fungoj
 El interarbaj sidejoj siaj. Tie, ĉi tie
 Funeloj de kantareloj el sub musko tra breĉo
 Kvazaŭ honteme sin ŝovas al la sun' ekrigardi.
35. Tie sterniĝas arbare teleroj velurulaj.¹⁾
 Tie sur herbejo pufas laktariaj²⁾ tuberoj.
 Tie sub piceoj ĝermas brunkaruloj³⁾ pogente,
 Tie el pinar-putraĵo eliĝas triholomo,⁴⁾
 Tie ruĝetaj, blugrizaj rusuloj⁵⁾ kaŭriĝas,
40. Gajaj kaj tute senzorgaj bele kreskas. Ĉi tie,
 Apud arbedoj, ĉe pado paŝtista, ringboletoj⁶⁾
 Kvazaŭ kalikoj renverse, kiel Mickiewicz diras.
 Inter alnaro jen skabroj⁷⁾, el stump' — armilarioj⁸⁾,
 Inter ŝtipoj sur splitejo herbejfungoj⁹⁾ elĝermas.

45. Jen aknozaj amanitoj, mukozaĵaj piprofungoj¹⁰⁾,
 Intermikse — hundofungoj¹¹⁾, eĉ per nom' ne signitaj.
 Ilin nek homoj kolektas, nek bestoj rodas, nur se
 Brutoj tra arbar' kurante piedrompas, aŭ ili
 Mem laŭnature forverlas kaj samloke forputras :
50. El ilia sterk' elfluas rondo de herb-plantidoj.
 Inter ĉiuj plej elstara tamen estas boleto¹²⁾,
 Laŭ la vortoj de l' kanteto — "kolonelo de l' fungoj" :
 Larĝa, dika, pufiĝinta, kvazaŭ tubo solida
 Estus renverse kovrita per plado emajlita.
55. Rapide kreskas, abundas kaj longtempe ekzistas
 Versipeloj¹³⁾ kaj luridoj¹⁴⁾ kaj diversaj aliaj.
- Juniperoj, kiel floroj, verdas sur kamp' senuza :
 Sub ili leporoj kuŝas, neste kovas perdrikoj.
 Veproj kun barboj herbtufaj borderas arbarlimon.
60. Tra l' tuta arbaro lumas disparcelaj linioj.
 Alnoj, kampejo de skabroj, kreskas laŭ rand' arbara,
 Traŭbojn avelajn sur branĉoj alte sun' maturigas.
 Inter marĉejoj fonthavaj, en la val' luliĝantaj,
 Tufoj vimenaj longvergaj ombron freŝan ekamis.
65. Sur Ŝlave-deklivo riboj posedas la rifuĝon
 Ĉe ŝlimmarĉejo ; ĉi tie viburnoj sangogutas.
 Ĝis vidolimo montece vastas la blankarbaro :
 Jen, betuloj, kiel scirpoj¹⁵⁾, la deklivon ĉirkaŭis,
 Jen, tremoloj tutfolie tremetas, kvazaŭ ili
70. Spertus timon, kiu skuis la kolubro-filidon¹⁶⁾.
 Tie kverkoj kaj fraksenoj al piceoj asistas,
 Kvazaŭ la kolubredzino sian edzon priploros,
 Kiam anstataŭ laktŝaŭmo alflosis ŝaŭm' el sango.
 Kaj pro dolor' ŝi verdiktis kune kun la geknaboj
75. Aliformiĝi en arbojn — kaj ŝi mem iĝis piceo,
 Siajn geknabojn vestinte per arbfolia vesto.
 Kaprosaliko¹⁷⁾, paduso, pirujo kaj pomarbo,
 Sian fratinton akuzas svelta kornus-arbedo.
 Ulmoj, frangoloj, tilioj kaj nekunkalkulitaj
80. Aroj da arboj aliaj inter ili semitaj.
 Ilin konas nur la homoj, kiuj arbare kreskis,
 Kuracistoj kaj sorĉistoj, tra arbaroj vagantaj,
 Per folioj kaj arbŝeloj, per vegetaj-radiko
 Kontraŭ malsanoj kaj sorĉoj la popolon helpantaj.

85. Do nin, simplecajn homidojn, la rigard' mem karesas :
 Kiel per verda tegmento Providenc' ilin kovras,
 Kiel ĉiu burĝoneto estiĝas kaj krevadas :
 Kiam per floro-kazeo la pomuoj griziĝas,
 Dum somere ili verdas flanke de pinarbaro.
90. Kiam folioj aŭtune iĝas flave-ruĝetaj
 Kaj deklivoj de Marĉiupis¹⁸⁾ kvazaŭ per sang' tegiĝas,
 Kaj kiam nudaj trunketoj primaveron atendas. . .
 He vi pinoj, pinetoj ! Vi pinoj nekalkuleblaj !
 Densaj, belaj kaj sveltkreskaj, kun florsimilaj pintoj,
95. Vintre somere vi verdas, kiel rutoj ĝardene,
 Trunko batiĝas al trunko, kiel kanoj luliĝas.
 Netravidebla densejo — eĉ kurta distanco,
 Malgraŭ, ke baras vidadon nek arbtrunkoj falintaj,
 Nek branĉoj sekaj kaj nudaj, inter si plektiĝintaj.
100. Nur pinoj altaj kaj glataj, kvazaŭ senbranĉigitaj.
 He odorado, nu kion ! Tie ĉi — pinrezino,
 Tie ĉi floro-aromon ventospiroj alportas,
 Sentas vi ruĝan kaj blankan trifolion herbejan,
 Kamomilojn, timianojn, herbajetojn la kampajn.
105. El formikoj vi flarsentas propran ties odoron,
 Kaj el arboj, el strobiloj, kaj el pingloj, folioj
 Ĉiam aliajn aromojn : kiam ventet' ekblovas,
 Ĉiun fojon vi enspiras malsaman bonodoron.
 Jen, vakcinioj kaj muskoj per arbaro ektiklis,
110. Jen, odor' de arbofloroj — kvazaŭ ĝarden' alfluis,
 Kvazaŭ arbaro mem spirus kiel besto vivanta :
 Siajn odorojn ŝutinte al herbejoj kaj kampoj,
 Ĝi rehavas la tieajn. Meze de pinaj boskoj
 Bele vi sentas odoron de plugkampoj, herbejoj.
115. Ĉio ĉi tiel miksiĝas kaj per vent' maldensiĝas,
 Ke eĉ nazo ne ĉiujn ĉi odorojn ekkonas.
 Ŝajnas nur, ke akordiĝis kamp', herbej' kaj arbaro,
 El parfumoj plej valoraj pretiginte miksaĵon,
 Dion glorante incensas tiel pace, afable,
120. Kvazaŭ ili kanklus¹⁹⁾, ridus, kantus, plorus kortuŝe.
 Ĉiuj ĉi voĉoj diversaj kunteksiĝas en aron,
 Sen esti dise senteblaj — koron nur emocias.

Bele susuras arbaro, ĝi ne nur bonodoras, —

- Laŭtsone, gaje kaj ame muĝas, flustras, sonoras.
125. Meznokto estas kvieta, ke oni aŭdas kiel
Juna folio aŭ floro sur branĉetoj estiĝas.
Kiel per branĉaro flustras sankta arbovortado,
Kiel la steloj flagretas, kiel rosguto falas.
Ankaŭ niaj sentoj tiam en la kor' trankviliĝas,
130. Kaj la animo per preĝo levas sin al ĉielo.
Kiam tagiĝas kaj lumo inundas la arbaron,
Kiam la kapoj de l' herboj sub ros' sin klinas teren,
Tiam vekigigas pinbosko, ĉesas regi kvieto.
Lante revenas la sankta parolado de l' tago.
135. Kiu susuras? — Folio, ekscitita de vento.
He en la nest' vekiginte, dorma birdo skuiĝis.
Kiu krakas? — Tie lupoj, ĝi tagiĝon flarsentas
Kaj post noktoĉaso haste laŭ arbarrando kuras.
He vulpo en la kaŝtruon — kun anserid' enfaŭke,
140. He melo tretas el kavo sia propra subtera.
He kapreolo gajplena tra pinaro galopas,
He sciureto de pino vigle al pin' saltadas,
He ermeno kaj mustelo, kaj diversaj bestetoj
Vivoplenaj sin amuzas tra la spacoj arbaraj.
145. Kiu frapas? — Tie pego arbotrunkon bekhakas.
Kiu mekas? — He skolopo longkrurulo alvokas.
Kiu flustras? — He vipuro siblas el arbostumpo,
He per la flu' lante plaŭdas la rivero Ŝventoji.
Kiu parolas? — He tie anseroj sur la strando,
150. He cikonio bek-klakas neste apud arbaro,
He tie anasoj "prij! prij!" descendinte sur marĉon,
Tie upupo demandas la edzinon kaj filon:
"Kion al vi do mi portu? Ne balbutu vantaĵojn!
Ĉu, ĉu, ĉu grajnoj? Ĉu muŝojn? Eble pluvo-lumbrikojn?"²⁰⁾
155. He kukol' swingmove pufa ĉirkaŭ si okulumas,
Jen, ĝi ekploras kun plendo, jen ekridas-ridegas.
Tintas, sonoras arbaro, jen oriolo Evan
Vok-incitas: "Eva, Eva! ne paŝtu sur herbejo!"²⁰⁾
"Jen, ĉe river'" ri-u! ri-u! ri-u! tringo"²¹⁾ ekkriis,
160. Kaj plej diversa voĉado ĉielarke eksplodis.
Ĉiam malsama parolo, ĉiam alia gamo:
Kardeloj kaj filoskopoj²²⁾, turdoj, ankaŭ paruoj,
Pigoj, garoloj — kaj ĉiuj kantas, pepas laŭsie:

165. Tiu ridas, tiu veas, ĉi — absurdojn deliras.
Sed ilin ĉiujn superas voĉo de najtingalo :
Plena, laŭta kaj korkapta, iel neefemera,
Tra arbedaro sonoras, trilas, ĉiam varias
Kaj en animon fiksiĝas, kiel kantoj litovaj.
170. Ĉiuj ĉi voĉoj kunfluas en unu sonamason,
Kvazaŭ ĉiu folieto pepus, ĉirpus, krietus,
Kaj ĉio laŭkrone plektus kanton unuaniman : —
Sonas ĝi, tonriĉa sonas sen recitado ŝtupa :
Eĉ orelo tiujn voĉojn distingi ne kapablas, —
175. Ŝajnas kvazaŭ sur herbejo herbajetoj ekflorus,
Do la floretoj inter si tiel mikse plektiĝus,
Ke oni vidas elfore belan buntan tapiŝon.

He iam antaŭ nuntempo nia bosko havigis
Plej grandan oportunecon, plej serenan trankvilon !

(*Daŭrigota*)

GLOSARO

- 1) Velurulo, fungo, kies scienca nomo — *Lactarius vellereus*.
- 2) Laktario — *Lactarius trivialis*.
- 3) Brunkarnulo (litova popoltermino) — *Lactarius deliciosus*.
- 4) *Tricholoma flavovirens*.
- 5) Rusulo — *Russula delica*.
- 6) Ringboleto — *Boletus luteus*.
- 7) Skabro — *Boletus scaber*.
- 8) Armilario — *Armillaria mellea*.
- 9) *Psalliota campestris*.
- 10) Piprofungo — *Lactarius piperatus*.
- 11) Hundofungoj — tiel la litovoj nomas ĉiujn nemangeblajn fungojn.
- 12) *Boletus edulis*.
- 13) Versipelo — *Boletus versipellis*.
- 14) Lurido — *Boletus luridus*.
- 15) Scirpo — *Scirpus*.
- 16) Aludo al la legendo litova pri la regino de kolubroj (vd. p. 13 de OOMOTO '72).
- 17) Kaprosaliko — *Salix caprea*.
- 18) Elparolu : *Marcjupis* (rivereto).
- 19) Kanklo (litove : *kanklés*) — litova nacia muzikinstrumento, kiun oni ludas plukante la kordojn per fingroj.
- 20) En la litova originalo — onomatopeoj (netransdoneblaj alilingve).
- 21) *Tringa*.
- 22) *Phylloscopus*.

Al triumfanta mond-koncepto

(Diadalmaş világ-nézet-hez)

(2)

Post la matenmanĝo kaj la subita travivaĵo ĉiu iris ripozi, ĉar estis tre streĉa la hieraŭa vojo.

Ŭde en hela negliĝo rigardas al la malproksimo kaj ekpaŝas. Pri la parolo de Titok ŝi meditas. Estas ebleco, ŝi diras en si mem kaj la paŝoj iĝas pli rapidaj. Estas eblecoj, estas, diras ĉiu vorto de Titok. Granda ĝojo estas por ŝi scii, ke ekzistas ebleco ekkoni la originon de la vivo kaj ekzistos ebleco poste por la reviviĝo.

Ŝi ekhaltas por sekundo. Ĉu ŝi laciĝis? Ne! Kial do la halto? Multan laboron tio bezonos. Se necesas, ŝi sin donos, nur estu rezulto.

Ŝi alvenis al loko, kie la abiaro estas maldensa kaj la sunradioj atingas la muskan teron. La abioj plurfoje baras ŝin de la ekstera mondo, tamen ŝi ĉirkaŭrigardas kaj, vidante neniun, ŝi demetas la negliĝon kaj denove ĉirkaŭrigardas. Poste sekvas la mamtenilo kaj la bankalsoneto.

Ĉi tie en jarmila silento de la

abiaro ĉiam verda ŝi kuŝiĝas dorse sur la lantukon, sub kiu estas la mola musko ŝvelanta.

La sunradioj, tuŝiĝinte kun la maleoloj, grimpas scivoleme sur la femuroj virofrenozigaj al ŝia sino, kiun ili delikate karesas sen ŝia protesto. Poste ili glitas plu al ŝia brusto kun cicoj rigardantaj iom al la alta frunto. Tie ili ekhaltas kvazaŭ dirante :

Viroj, ne delektu vin en ĉi ĉarmoj, evitu ĉi sinon, ĉar tuŝi vi ne povas ĝin, novan vivon ne akceptos ĝi kaj ĉi cicojn infana buŝo ne ek-tuŝos. Nur energion por laboro ŝi prenas de la suno, la pruvo — en penso eĉ nun ripetas : ekzistas, ekzistas eblecoj kaj tiun rideton sur ŝia vizaĝo estigas nur ĉi tiu scio.

Viro, vi ne estos feliĉa kun ŝi, ŝin signis al si la scienco. . .

Tamen en ĉi momento la viro, kiu ĝis nun rigardis en la malproksimon, ekpaŝas en la saman direkton. La muska tapiŝo helpis al li surprizi la nudulinon, sed la seka herbo, kiu

eksusuras kaj la seka branĉeto, kiu rompiĝas sub lia plando, signalas al ŝi la proksimiĝon de iu.

— Si alarme krias : kiu vi estas ?

— Bátor, sonas la respondo.

— Atendu, ĝis mi revestas min!

— Daŭrigu, mi ne iras plu.

— Mi ne kredas al vi. Ŝi surmuntas la haŭtkolorajn kalsoneton kaj mamtenilon, kiujn ŝi uzos en strando.

Kiam Bátor ekvidas ŝin preskaŭ nuda en ĉi izola loko, ŝajnas al li, ke ŝi atendis lin.

— Kiel bela estas vi Ŭde, komencas li la parolon. La knabino silentas, ŝi ankoraŭ ne retrovis sin pro la interrompo de sunbanado. Al abio ŝi apogas sin kaj ŝajnas, ke ŝi lasas la viron barakti en sia embaraso.

Li mencias, ke tiel feliĉa li estas nun, kiel en la arbaro de Ŝomkut, kiam li la unuan fojon povis ŝin ĉirkaŭbraki kiel li tion deziris. Ĉi feliĉon li sentis ankaŭ ĉe Fekete- kaj Fehcr-fontoj kiam ŝi metis lian manon sur ŝian koron.

Ŭde reakirinte sian kvieton objektive rememorigas lin, ke tio okazis nur hazarde aŭ tio estis nur esploro, sed nenio pli.

Tion mi jam diris al vi kaj nun mi ripetas.

— Vi pravas, sed ne forgesu, ke de post tiu hazardo en la arbaro de Ŝomkut mi ne havas trankvilon. Ne nur morto okazis tie, sed ankaŭ

naskiĝo. Mia amo tie iĝis definitiva, tie sigeliĝis. Vi ja scias, ke mi amas vin, tre amas vin, estu mia edzinetto!

La junulo apenaŭ povis eldiri ĉi vortojn. Al li ŝajnis konturiĝi la nigra triangulo, ŝvelanta inter la femuroj de la knabino. La mamoj volis liberiĝi el la prizono kaj la cicoj, ho, la cicoj tro pikis la silkon diafanan. . .

— Ĉu vin ne vokas la vivo ? Ĉu por vi ne estas sublima la amo ? Kiel vi povas silenti ?

— Jes, mi sentas, ke vokas la vivo. Mia koro eĉ forte ekbatis atente ĉe Meleg-fonto, kiam vi diris, ke la artefarite ricevitaj albumin-gutoj devas nur duiĝi, do multiĝi kaj la granda sekreto de la vivo solviĝis.

Ĉu tio ne estas sublima tasko por kio meritas vivi ?

— Ĉu mi diris ? demandis Bátor iom surprize.

— Jes, vi mem, ke nur la kondiĉon ni devas trovi aŭ krei. Se la kristaliĝo kaj la reviviĝo estas ebla ĉe la virusoj, tiam ĉi rezulto ankaŭ en alia tereno estas valida! Dank' al Stanley la granda enigmo solviĝos, ĉar la unua vualo defalis jam de sur ĝi.

— Mi diris tion nur pro kolero al Lelkeŝ, kiu negas ĉian rezulton de la progreso, sed vi devas scii, ke la vojo ĝis la solvo ankoraŭ estas longa. Do ni povas kune labori kun unuiginta

forto, sed pro tio vi ne devas rezigni pri la amo.

— Se la vojo estas longa ĝis la solvo, ni ne povas perdi tempon pro la amo, se ni vere volas plenumi, kion mi promesis al oĉjo Ĉalán en la arbaro de Ŝomkut kaj vi dum lia enterigo.

Bátor multfoje spertis, sed nun en sia tuto konturiĝis la danĝero, ke ŝin vere signis al si la scienco. En sia granda malespero, li demandis ŝin per elrompa voĉo :

— Se ni duiĝas, triiĝas kaj niaj infanoj ekviviĝas, ĉu tio ne estas sublima ?

— Jes, sed kiom da tempo ili bezonas ? Ĉion mi devas forpreni el la scienca laboro.

— Ĉu ili ne meritas tempon, nur la scienco ?

Ŝi serĉante la vortojn iom malfruis kun la respondo. Bátor senpacience donas la pluan demandon : Ĉu tio estas via lasta parolo ?

Por Ŭde ĉi dialogo ne estis nur vortoj malplenaj. Ŝi dum kelkaj minutoj travivis ilian plej plenan signifon kaj la konsekvencon. Kvazaŭ ŝi portas sur ŝiaj ŝultroj la pezan baraktadon de centmiloj da virinoj, kiuj rezignis en paseo kaj devos rezigni ankaŭ en futuro pri la sukceso-serio en la scienca laboro pro la perdita tempo, dediĉita al la infanoj. Ŝi sentis, se Bátor plu atakas ŝin, ŝi

terenfalos. Fine ŝi diris :

— Lasu min sola ! Mi tre petas vin, obeu al mia peto !

Bátor ekiris per mekanika paŝado, kvazaŭ oni estus eltranĉinta lian cerbon. Dum la tuta tago li vagadis sola en la ĉirkaŭa arbaro. Alvespere, kiam li proksimiĝis al la domo de la mastro, li renkontiĝis kun Iró, al kiu li rakontis la okazintaĵon inter Ŭde kaj li.

Antaŭ la domo flagras la fajro kaj ĉirkaŭe silentas la vespera malumo. La grupo preparas la vespermanĝon. Ili ricevis freŝan lakton de la mastrino. La mastro traforkegis tage la fojnon por certigi sensurprizan nokton al ĉiu, sed precipe al Adatanoŝ. Li tre malfacile kvietiĝis post la matena salto. Ĉe la apuda fajro kaŭradas Hétfaluŝi kun Sorgoŝ kaj Ŝerenj. Ili rostetas lardon.

Vidám ricevis pardonon de la virinoj. Li devis promesi, ke li ne plu parolos pri tiel maldeca afero. Li nun rakontas detalon al la mastro pri la morto de Ĉalán. La mastro tre kompatas la forpason de la olda amiko. Ne foje okazis, ke Ĉalán restadis kelkajn tagojn ĉe li. Ili kune trairadis la ĉirkaŭaĵon de Ŝarga-fonto ĝis la loko, kie la valo iĝas malvasta kaj ekaperas la fonto mem. Ofte ili manĝis truton, ĉar ili kune fiŝkaptadis. Dum paŭzo Ĉalán rakontis al la mastro pri la reviviĝo. La mastro

komprenis el ĉio nur tiom, ke ankaŭ la homo reviviĝos iam simile al la akvo aŭ ŝaŭmo, sed kiel, tion li ne povis kompreni. Nun li demandas al Vidám, kio kaj kiom estas vera el tio?

— En ĉi problemo vi scias pli, diris Vidám al Bátor, kiu aŭskultis ilin.

— La problemo estas pli malfacila kaj komplika ol imagis tion Ĉalán. Ankaŭ ni mortas kaj eble ankaŭ la sekvanta generacio ĝis ni ekscios pli esencan pri ĉi problemo. Profesoro Titok parolis ĉe Meleg-fonto nur pri la eblecoj, sed ne menciis la malfacilecon, kiu staras en la vojo de la venonta laboro.

Titok rekonis, ke li parolis nur pri la eblecoj, ĉar tio estis lia tasko.

— Estus bone, se Bátor kompletigus ĉi mankon, aldonis Titok.

Ankaŭ la mastro petis lin. Bátor ekkaptis la okazon, tiom pli, ĉar dum la tuttaga vagado nur pri tio ĉi li meditadis.

— La albuminoj estas tre komplikaj organikaj kombinaĵoj, kiuj konstruiĝas el aminoacidoj. Oni demonstris en la vivanta organismo nur ĉ. 22 aminoacidojn. Sed el kvin aminoacidoj povas estiĝi 120 penta-peptidoj, en kiuj ĉiu aminoacido nur unufoje partoprenas kaj nur la vicordo de la kombino diferencas. Se unu aminoacido plurfoje partoprenas en la

molekulo jam prezentigas 30625 eblecoj. El la multobla ripetado de la 22 aminoacidoj doniĝas tia kombina ebleco, kiun oni povas esprimi nur per astronomia nombro de 27 ciferoj.

Pro tio, ĉiu esploranto devas scii ke ilia hararo iĝas griza aŭ eĉ blanka kaj la tuta problemo ne solviĝas.

Ŭde iĝas pli atenta. Ĉu tio estas adresita al mi? ŝi demandas en si mem, sed lasas sen repliko, ke Bátor parolu plu.

La kombinoj de aminoacidoj estas firmaj, sed ekzistas ankaŭ lozaj. La lastaj sub milda fizika aŭ kemia influo ekŝiriĝas, denove formiĝas aŭ reordiĝas ŝanĝante samtempe sian ecaron, do sian individuon!

Je la lastaj vortoj Ŭde ekhois, sed Bátor verve daŭrigis plu.

El la zigzagaj aminoacido-ĉenoj de la sistemo tre grandnombra flank-ĉeno branĉiĝas dis kaj ĉiu kun alia kaj alia kemia ecaro. Ĉi flank-ĉenoj kuniginte kun la ĉefĉenoj estigas densan maŝaron. La maŝaro mem estas loza. Jen disiĝas, jen kunigiĝas je novaj kombinoj. Ĉi tiun situacion plu komplikas la materialoj: akvo-molekuloj, sukeroj, grasoj, enzimoj, troviĝantaj en la kavoj de la maŝaro, kiuj materialoj alsorbiĝas al la liberaj flank-ĉenoj aŭ deigiĝas de ili. Do la tuta strukturo de la molekula sistemo ĉe la vivanta albumino estas en senĉesa movo, en sentrankvila fizika kaj

kemia ŝanĝado.

La hodiaŭaj esplorantoj devas scii, ke ne nur ilia hararo blankiĝas, sed, aperas sur la vizaĝo la faltoj, elfalos la dentoj, eĉ la tuta dentaro, konsumiĝos ĉiu kiel la kandelo kaj forpasos el ĉi tiu mondo, sed ili ne solvos la tutan problemon.

Ŭde nun konvinkiĝis, ke ĉi vortoj estas adresitaj nur al ŝi kaj ŝi intencis respondi je ili, sed neatendite Lelkeŝ interrompis la parolanton.

— Mi jam diris, ĉu ne, ke vi ne solvos ĉi problemon. La planoj de Dio estas neesplorableblaj!

— Sinjoro paroĥestro, ĉu vi ne observis, ke Bátor volas nur fortimigi

min de la esplora laboro? Li intence prezentas tiel la problemon, ke mi ektime ne forgesu pri la vivo. . .

— Ĉiu estas kontraŭ mi, eĉ Ŭde, diris malĝoje Lelkeŝ.

— Ne nur al Ŭde, sed ankaŭ al sinjoro paroĥestro mi diras: estas vere, ke multaj forpasos unu post la alia, sed anstataŭ ili centmiloj enpaŝos en la esploran laboron. Ĉiu solvos parteton el la granda tasko kaj la komuna rezulto de la milionoj sendube donos la solvon de la tuta enigmo. Tion ĉi mi diris al ambaŭ, sed nun mi daŭrigas nur por Ŭde.

— Ne nur la materiaj kondiĉoj estas necesaj, sed ankaŭ la harmonia,

Anonco

Dum la pasintaj 6 jaroj la abonprezo de OOMOTO restis kompare tre malalta, sed dume la kostoj de la eldonado kaj poŝto plialtiĝis; kaj nun ni estas devigitaj konformigi ĝin al la nunaj cirkonstancoj. Ekde la nova jaro 1973 ĝi fariĝos 1200 enoj aŭ egalvaloro (ekz-e: 12.00 ned. guldenoj).

Sed konsiderante la transiran tempon bezonatan por ĉi tiu anonco, ke ĝi atingu niajn legantojn, kaj la cirkonstancon, ke oni intertempe sendos al ni abonojn aŭ reabonojn je la malnova prezo, ni akceptos ilin, kiel validajn, ĝis la fino de februaro de 1973.

Samtempe ni petas afablan komprenon de niaj legantoj, ke pro diversaj kaŭzoj ni kovris per tiu ĉi numero la trionjaran periodon — de julio ĝis oktobro.

Administracio de Oomoto

familia vivo. Kiam vi laciĝos pro la ĉiutaga peno, kiam vi estas saturita de la scienca laboro kaj vin afliktas la vomincito, kien gvidas via vojo sen familio? Se duboj vin mordos pri la sukceso de la longa laboro senrezulta, ĉu vi pensas, ke la soleco, la granda malpleno, la abismo helpas vin plu en la esplora laboro?

Iĝis granda silento. . . Eĉ la fajro ĉesis krakadi. Sorĝoŝ kaj Ŝerénj metis novajn branĉojn sur ĝin, ke ĝi varmigu, lumigu plu.

Ĉar Bátor ne daŭrigis la paroladon kaj Ŭde ne respondis al lia demando, Hétfaluŝi rekonis, ke en la parolado de Bátor estis ankaŭ atentigo por Ŭde, sed kion li diris, ĉio estas vera.

— La ĉelo ne estas tiel simpla, kiel en komenco oni supozis, ke ĝi konsistas el la ĉelo-kerno kaj la protoplasmo, kiujn ĉirkaŭas la ĉelohaŭteto.

En la molekulo de la akvo aŭ salo nur malmulta atomo unuiĝas, sed la molekulo de la albumino enhavas plurcentmilojn, eĉ milionojn da atomoj. Same senfina estas la nombro de la albumin-molekuloj, kiuj kemie kaj fizike diferencas unu de la alia. Ĉiu albumin-molekulo de la protoplasmo estas aparta individuo kaj pro tio la protoplasmo tre malofte estiĝas en identa konsisto. Tio signifas, ke kiom da homoj, tiom da

personoj!

Lige al la temo Ŭde iom forrevadis, sed aŭdinte la vortojn “aparta individuo” ŝi demandis:

— Kiel vi diris? Bonvolu ripeti la lastan parton.

Dume ŝi ekremetis parte pro la friska aero vespera, parte pro ektimo intelekta. Dubo ŝin ekkaptis. Subite ŝi ĉirkaŭrigardas kun serĉanta rigardo, kiu glitas de vizaĝo al vizaĝo ĝis ĝi ekhaltas ĉe Bátor.

Hétfaluŝi ripetas la petitan parton de vorto al vorto.

— Ĉiu albumin-molekulo de la protoplasmo estas aparta individuo kaj tial la protoplasmo tre malofte estiĝas en identa konsisto. Jen la malfacila parto pri la reviviĝo de la individuo!

Kion ja ŝi volas? Ŝi metas al si la demandon primemorante la vortojn de Bátor: “Je la dispono de la naturo estis milionoj da jaroj, por la homo nur 30-40 jaroj. . .

Ŭde nun ekpensas pri Madách, la aŭtoro de “La tragedio de l’ homo” kies bildoserio el la historio de la homaro povis estiĝi en la realo kaj en la literaturo nur, ĉar kiam la homoj scias jam iom, la kulturitaj, inteligentaj kapoj ĉesas funkcii pro la morto kaj venas denove la stultaj infanoj. . .

(Daŭrigota)